# NIA PONTO

Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanujo)
Redaktas:
Jesús Miguel García Iturrioz

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: 60 €. Familia: 70 €. Juna(ĝis 30 jaroj): 20 €.
**KUTXABANK-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550**

**JULIO/SEPTEMBRO 2022** **Nro. 132 (3/22)**




Post forpaso de somero, nia E-Grupo reviviĝas. Inter aliaj aferoj, komencos novaj E-kursoj, por progresantoj kaj por komencantoj, kun tri instruistoj. Pliaj informoj ene.

Una vez pasado el verano, vuelve la actividad a nuestro Grupo. Entre otras cosas, vuelven los cursos de Esperanto, para iniciados y para principiantes. Este año, con tres profesores y diferentes horarios. Más información en páginas interiores.

# LOKE ...

## Parta renovigo de la estraro.

Kiel anoncite, la 10an de junio oni okazigis la laŭleĝe devigan ĝeneralan kunvenon de nia asocio. Bedaŭrinde ĝin partoprenis nur 7 membroj.

Inter aliaj aferoj oni nomumis novan estraron, kiu restas jene:
Prezidanto: Francisco López López. Vicprezidanto: David Redondo Rodríguez.
Secretario: Jesús Miguel García Iturrioz. Kasistino: Iciar Arteche Urrutia
Voĉdonantoj: Octavio Gutiérrez Moja, Edorta Moreno Martín kaj Diego Guerín Aguilar.

## Kristnaska loterio / Lotería de Navidad.




Kiel kutime, la Grupo ankaŭ ĉi-jare vendos kristnaskan loterion pere de biletoj eldonitaj tute en Esperanto. La disvendado komencos tuj post la festotago de la 12a de oktobro, t.e., **la vendredon 14an de oktobro**. Ni ludos la numeron **02.054**.

Después de la festividad del 12 de octubre, comenzaremos la venta de la tradicional lotería de Navidad, es decir, **a partir del viernes 14 de octubre**. Este año vamos a jugar con el número **02.054**.

## Vizitis nin.



En junio vizitis nin Konrad, el Tubingo (Germanio), kun kiu nia Grupo ofte renkontiĝas ene de fejsbuka rondo. Tiel kiel eblas vidi per la fotoj, niaj amikoj David kaj Igone okupiĝis pri akceptado.



En julio vizitis nin Madeleine Canavese, el Usono. Ĉikaze estis nia Prezidanto Pako kaj lia edino, kiuj okupiĝis pri rendevuo en Gernika, kie loĝis Madeleine ĉe amikino.

Kaj aliaj esperantistoj vizitis Bilbaon, sed ni ne povis okupiĝi pri ili pro somerferiado kaj sekva neĉeesto de bilbaoanoj en la urbo, aŭ pro alia kialo: Yevgeniya Amis (Montrealo), Jannick Huet Schumann (Grésillon), Albert Stalin Garrido (Madrido).

**LOKE ...**

## Omaĝo al Félix Díez Mateos.




La 10an de septembro, la Magistrato de Villaviudas (pr. *Bijabiúdas*), vilaĝo de la provinco Palencia, organizis omaĝon al unu el la plej elstaraj esperantistoj de la E-Grupo de Bilbao, Félix Díez Mateos, kiu naskiĝis en tiu loko.

En la oficiala retpaĝo de la Magistrato troviĝas mallonga biografio, en kiu eblas legi:

"Li estis entuziasma esperantisto, Prezidanto de la *Grupo de Bilbao* kaj de la 27a Hispana Kongreso de Esperanto en 1966, kie li devigis la aliajn nomi lin "*Felikso*", lia nomo en Esperantujo, uzata de lia germana edzino Frieda kiel karesnomo".

En la omaĝo prelegis Federico Mayor Zaragoza, Ĝenerala Direktoro de UNESKO inter 1987 kaj 1999.

Kaj ankaŭ prelegis Ricardo Díez-Hochleitner, nepo de Félix Díez kaj filo de lia samnoma patro, Ricardo Díez Hochleitner, ekonomiisto kaj diplomato, Prezidanto de la Klubo de Romo inter 1990 kaj 2000, kaj "patro" de la hispana edukreformo de la jaro 1970.

La urbestro de Villaviudas sendis invitilon ankaŭ al la Prezidanto de HEF, sed ne eblis la partopreno de iu estrarano.

*(https://villaviudas.es/index.php/2022/09/08/homenaje-a-felix-diez-mateo/)*

## Partopreno en la 20ª Internacia Tago pri Paco en Toloso.



La 17an de septembro oni organizis en Toloso (Gipuzko) la 20an Internacian. Antaŭ tri jaroj Esperanto estis elektita kiel unu el la kvar laborlingvoj de la evento. La nuna devis okazi en 2020 kaj estis prokrastita al 2022 pro la pandemio. Multaj el la organizoj, kiuj kontribuis al la evento per sendo de 3-mn filmeto de koruso kantanta por paco, estas ĉu esperantistaj ĉu kontaktitaj per nia informkampanjo. Sur la foto, nia amikino **Susana Zabaco**, kiu partoprenis la eventon.

LOKE ...

## Novaj kursoj en nia Grupejo.





Kun la alveno de aŭtuno, ankaŭ alvenas novaj kursoj:

- **Meznivela**: komencos la 21an de oktobro kaj daŭros ĝis decembro. Por tiuj, kiuj iam studis la lingvon. Gvidanto: David Redondo.

- **Babilrondoj**. De la 13a de januaro ĝis la fino de februaro.

- **Baza kurso**: de marto ĝis junio. Gvidantoj: David Redondo, Edorta Moreno kaj Hodei Redondo.




Ne dubu! Informiĝu ĉe nia Grup-ejo. Ni kalkulas je via ĉeesto kaj je via helpo por propagandi la kursojn inter viaj konatuloj.

## E-kongresoj 2023.







- 96-a SAT-kongreso. Kastelo Greziljono (Francio). 18/25 julio.

- 40-a Pola E-Kongreso. Siedlce, 96 km oriente de Varsovio. 20/23 julio.

- 108-a Universala Kongreso. Torino (Italujo). 29 jul./05 aŭg.

- 79-a Internacia Junulara Kongreso (IJK). Marina di Massa (Italujo)

- 81-a Hispana Kongreso. Sevilo/Sevilla. 12/15 oktobro (Dato ankoraŭ necerta)

**H.E.F.**

## Novaj kursoj de Esperanto en UNED.

Jam anonciĝis la novaj kursoj de Esperanto en la Universitato de Neĉeesta Edukado (UNED), denove en niveloj A2 kaj B1. La periodo de enskribiĝo komenciĝas la 13an de septembro. Vi povas koni la detalojn en la retejo http://www.cuid.uned.es.

*("Nia Voĉo", organo de Madrida E-Liceo (MEL). Septembro 2022)*

## CSIC denove proponis kunlaboron al HEF.

La hispana CSIC (Centro Superior de Investigaciones Científicas / Alta Organizo por Sciencaj Esploroj) denove proponis al HEF ke Ĝi partoprenu en la traduko de "lerneja scienca kalendaro" por 2023, projekto kies celo estas enkonduki la sciencan kulturon inter lernejanoj kaj vekigi ilian intereson pri tiu branĉo de la homa kulturo.

La kalendaro prezentos, por ĉiu tago de la jaro, ian sciencan aŭ teknologian datrevenon. Ĝi estis jam tradukita al la angla kaj al la diversaj lingvoj hispanaj: kataluna, vaska/eŭska, astura, galega kaj aragona.

Ni substreku ke temas pri grava kaj ege serioza propono de la plej alta instanco en Hispanio rilate sciencan esploradon, kie kunlaboras la plej kleraj sciencistoj de la lando.

Por la venonta jaro 2023 oni ne ŝanĝos la gvidilon, kiu akompanas la kalendaron, sed nur la kalendaron mem.

## Nova Prezidanto de HEJS.



Post demisio de William Guerrero, HEJS (Hispana Esperantista Junulara Sekcio) havas novan Prezidanton, nome, Enmanuel González, kromnome "Manu".

Ni bonvenigas lin kaj deziras plenan sukceson en tiu malfacila tasko, kiu estas engaĝigi gejunulojn al Esperantujo.

Samtempe, ni dankas al William lian laboron dum la lastaj jaroj, ĉefe en la interreta medio.

## Oficiala kurso en mezlernejo.

Nova oficiala kurso de Esperanto kaj en mezlernejo de Almenara en Vélez-Málaga, la sola hispana publika mezlernejo kie oni povas studi Esperanton kiel elektebla lernofako. Tiu ĉi kurso 29 lernantoj studos Esperanton en la 1a bakalaŭra kurso; estis preskaŭ 40 petojn por elekti tiun ĉi fakon sed kaŭze de organizproblemoj nur 29 povis fine studi ĝin. Estos la dua fojo, ke oni instruas Esperanton oficiale en la publika hispana eduksistemo. La unua fojo estis dum la kurso 2019-20, kiu bedaŭrinde oni ne plenumis pro pandemia enfermiĝo.

*(Informis J.A. del Barrio. 26/09/2022)*

**TRA LA MONDO ...**

# Grava atingo ĉe UN.

**Komitato pri Lingvoj estos prezidata de reprezentanto de UEA.**

Oni starigis en Novjorko Komitaton de Neregistaraj Organizoj pri Lingvoj sub aŭspicio de CoNGO, la Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Konsulta Rilato kun Unuiĝintaj Nacioj (UN). Entute 23 NROj aliĝis kiel fondaj membroj. La komitato celas doni pli grandan atenton al lingvaj demandoj en la politiko, praktiko kaj eksteraj rilatoj de UN, precipe en rilato al la ĝenerala graveco de demandoj pri lingvoj, lingva justeco kaj lingva nediskriminacio.

La reguloj de la nova komitato estis aprobitaj en kunsido la 18-an de majo kaj oni elektis estraron. La multnombre ĉeestata kunveno enhavis prezenton de funkciuloj de Unesko pri ties lingvorilataj programoj, precipe multlingva edukado, la Internacia Jardeko de Inidiĝenaj Lingvoj, kaj la nova Monda Atlaso de Lingvoj.

Francis M. Hult kaj Humphrey Tonkin, reprezentantoj de Universala Esperanto-Asocio apud UN, estis elektitaj kiel respektive prezidanto kaj vicprezidanto. Francis Hult estas Profesoro pri Edukado ĉe University of Maryland Baltimore County (UMBC), kaj Humphrey Tonkin estas Emerita Prezidanto de la Universitato de Hartford.

Elektita kiel sekretario estis Linda Fitchett, iama prezidanto de la Internacia Asocio de Konferencaj Interpretistoj. Hans E. Becklin, de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) elektiĝis kiel kasisto. Daniel LeBlanc, de VIVAT Internacia, kaj Allison Rodriguez, de la Internacia Federacio de Tradukistoj (FIT), estis elektitaj kiel kromaj estraranoj.

*(Renato Corsetti. 12/06/2022)*

# Vi flipos.


Legante la titolon eble iu el vi komencos grumbli ... "Ne uzu tiajn hispanecajn vortojn, ke en Esperanto oni riskas krei dialektaĵojn..." Sed, nu tiun vorton mi trovis en la dua numero de la revuo "Kontakto", de la jaro 1964! (Vidu aldonan bildon: "ili flipos lernante Esperanton...")

Mi supozas ke vi jam legis en la lasta Bitbulteno, sed TEJO enretigis ĉiujn ekzemplerojn de "Kontakto" ekde la jaro 1963. Estas tre interese ĵeti rigardon al la pasinto. Ekz. vi eĉ povas trovi iun Miguel Gutiérrez Adúriz kiel konstanta redaktoro en la 80 jaro :-)

Oni povas legi la detalojn kaj la ligilojn al la revuoj en:
https://www.tejo.org/centoj-da-numeroj-de-kontakto-kaj-tejo-tutmonde-alireblaj-libere/

*(T.B. Prenita el Interreto. 03/06/2022)*

# La nova Prezidanto de TEJO, madrida.




Loĝanto de Madrido fariĝis la nova prezidanto de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). En voĉdono en monato julio, la filipin-devena esperantisto **Albert Stalin Garrido**, de kelkaj monatoj loĝanta en Madrido, estis elektita prezidanto de TEJO por la mandato 2022-2023.

*("Nia Voĉo", organo de Madrida E-Liceo (MEL). Septembro 2022)*

**TRA LA MONDO …**

## Plaĉa anekdoto pri Plácido Domingo



En Facebook, Paola Nigrelli mencias interesiĝon de Plácido Domingo pri Esperanto. Jen la teksto:

"Vivo estas vere riĉa je surprizoj. Ĉi posttagmeze ekskursante al Verono kun grupo da esperantistoj ni renkontis gravegan eminentulon. Ĉu vi rekonas lin? Kiam li komprenis ke ni scipovis paroli la lingvon, li petis aŭskulti nin. Poste li diris: "Estas mirinde, mi preskaŭ ĉion komprenas!" "Kie mi povas lerni ĝin?"

Do hispanaj geamikoj sendu al Placido Domingo facilan lernolibron!

*(L.N. en interreto. 25/08/2022)*

## Ĥoro el esperantistoj en la 20a Internacia Paco-Tago de UNESKO en Tolosa



Okaze de la 20a Internacia Tago pri Paco, Ne-Registaraj Organizoj partneraj kun Unesko, kunlabore kun la guberniaj (eŭskaj) instancoj, organizis grandan eventon, la 17an de septembro 2022, en Toloso (Eŭskio, norda Hispanio). Antaŭ tri jaroj Esperanto estis elektita kiel unu el la kvar laborlingvoj de la evento, sed tiu ĉi devis okazi en 2020 kaj estis prokrastita al 2022 pro la pandemio. Tamen multaj el la organizoj, kiuj kontribuis al la evento per sendo de 3-mn filmeto de koruso kantanta por paco, estas ĉu esperantistaj ĉu kontaktitaj per nia informkampanjo.

Kiel ni jam informis en la paĝo 3, la eventon partoprenis nia amikino **Susana Zabaco**, membro de la E-Grupo de Bilbao, kaj nia amiko **Natxo Apaolaza**, el Vitorio, kiun videblas sur la apuda foto.

En la programo de la evento partoprenis internacia koruso gvidata de Zdravka Boytcheva, kun kantistoj el multaj landoj kaj kontinentoj, kantantaj en Esperanto. Ankaŭ okazos podia diskuto pri paco kun po unu reprezentanto el ĉiu koruso: Linda Le Nepveu reprezentos nian koruson. Unu el la celoj de la podia diskuto estas konfidi pli da respondecoj pri Unesko-agado al junuloj, kaj ĉiuj podianoj estos junuloj, krom Michel Thouzeau, la iniciatinto de la evento kaj de jardekoj organizanto de tiaj eventoj. La eventon eblos spekti per Jutubo.

*(François Lo Jacomo, Estrarano de UEA. 09/09/2022)*

# TRA LA MONDO …

## Ĉu UK 2024 en Afriko?




Estus bonege kongresi en Afriko, ĉar ili pretas okazigi grandiozan kongreson, kun nia subteno, kompreneble. Afriko atendas nin.

*(Ángel Arquillos. 21/08/2022)*

## UEA eksigis la ĉefdelegiton en Rusio.

La Estraro de UEA decidis ”provizore ne renomumi ĉefdelegiton en Rusio”. Tio signifas, ke la nuna ĉefdelegito Svetlana Smetanina perdas sian postenon. Ŝi estis forte kritikata pro siaj komentoj pri la milito en Ukrainio

La ĉefdelegito de UEA en Rusio devas esti eksigita, ĉar ŝi faris publikajn elpaŝojn pri la milito en Ukrainio neakcepteblajn por reprezentanto de UEA. Tion komence de aŭgusto postulis la tiama komitatano Osmo Buller.

La demando estis vigle diskutita dum la komitata kunsido de UEA en Motrealo, kie ĝin levis la komitatano A por Ukrainio, Jevhen (Eŭheno) Kovtonjuk. Post voĉdono la Komitato instrukciis la estraron ”raporti pri la decido pri la eksigo de la ĉefdelegito de Rusio ĝis la 30-a de septembro”.

Post la decido prezidanto Duncan Charters atentigis, ke la komitata decido ne signifas, ke la Estraro nepre decidos pri eksigo de la rusia ĉefdelegito, aŭ entute decidos ion ajn pri la afero ĝis la fino de septembro.

*(“Libera Folio”. 30/08/2022)*

